Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 4, Aprilo, 2008

Salminejo Wieliczka

Leszek Kordylewski

Ekzistas nur unu Luno, nur unu Norda Poluso, kiujn oni povas viziti. Antaŭ nelonge nia s-no L. Kordylewski faris ekskurson al iel simile unika loko, kiu troviĝas proksime al lia naskiĝurbo Krakovo en Pollando kaj dum la lasta kunveno li prezentis al la esperantistoj en Ŝikago:

La antikva salminejo Wieliczka (legu: velička) estas la unusola en la mondo kombinaĵo de naturaj tavoloj de salo kun la salartaĵoj kreitaj subtere de homoj. Dum centjaroj sennombraj tuneloj kaj galerioj penetris en la terfundon tra la salaj rokegoj. Wieliczka estas fama pro ĝiaj turismaj allogaĵoj kiel salonegoj ornamitaj de skulptaĵoj ĉizitaj en salrokoj, staplejoj kaj subteraj ĉapeloj lumigataj per kristalsalaj ornamlampoj. Laŭ la legendo de antaŭ jarcentoj oni malkovris salon en Wieliczka pro la ordono de Sankta Kinga, Reĝino de Pollando, kies ringon la ministoj mirakle trovis en la unua elfosita kristalo de salo. Tiu sceno estas ilustrita en la foto de la salaj skulptaĵoj.

La minejo funkciis jam en la mezepokaj tempoj, la plej frua dokumentita mencio de ĝi datiĝas je 1044 jaro. Dum la lasta mondmilito troviĝis tie subtere kaŝitaj fabrikoj de aviadilpartoj, kie la naziaj okupantoj de Pollando ekspluatadis slavlaboron de Judoj, poste murdante ilin en la najbara Auschwitz. Hodiaŭ oni daŭre elfosas salon en Wieliczka per modernaj metodoj, dum la historia kaj naturprezerva partoj allogas la turistojn. Oni povas havi geedziĝon en la belega subtera ĉapelo, dancon en la sala balĉambro, okazas tie koncertoj, ekspozicioj, kunvenoj. En la subteraj lagetoj oni ne povas droni pro tre dense sala akvo. La turismaj partoj de la minejo, lumigitaj elektre, vivplene abundas je tumulto de laŭtaj turistoj kaj eventoj. Tamen la plimulto de la subteraj pasejoj restas en la mallumo kaj regas tie teruriga absoluta silento. Malofte iu enpaŝas tie kaj kutime la "mortaj" koridoroj restas fermitaj. La konstanta, milde varma temperaturo en la minejo rememorigas nin ke tie ni eble estas pli proksime al la Inferno... Ne mirinde do, ke la ministoj iam estis tre religiemaj, konstruadis tie ĉapelojn kaj religijajn artaĵojn, kaj eĉ ĝis nun anstataŭ “Bonan tagon!” ili daŭre salutas sin reciproke per iom arkaika “Dio benu vin!”

Mi havis la raran okazon eniri la kutime sigelitan, profunde subtere kaŝitan naturan ĉambron, kies muroj konsistas el brilaj salaj kristaloj frostitaj en tempo. Tiu ĉi unusola ĉambrego formiĝis nature en la antaŭaj geologiaj epokoj (Mioceno-Pleistoceno) kaj estis malkovrita nur antaŭnelonge, en 1898 jaro. Kiam la antikva sala maro sekiĝadis, iu aervezikego kaptiĝis en la maso de firmiĝanta salo. Sekve premo de la rokoj kontribuis al la formado de la krsitaloj nomataj halitoj, kiuj konsistas el pura salo (NaCl) kaj grandas ĝis dekoj da centimetroj. Por vidi tiun unikan naturan trezoron mi estis akompanata de unu privata gvidanto-geologo kaj ŝia helpanto, kiu portis por mi la pezan vivsavan ekipaĵon. Mi mem portis propran lampon kun peza baterio en la dorsosako. Oni vestis min en la protektan mantelon kaj fortan ĉapelon, kiu savis min dum mi hazarde frapadis la kapon kontarŭ malmolaj salaj rokoj kaj (ofte rompitaj de terpremo) lignaj subteniloj de la malaltaj plafonoj. Post la multhora vagado en senfinaj mallumaj koridoroj oni lasis min admiri tiun nekredeble belan naturan fenomenon de la Kristala Kaverno nur dum 10 minutoj. Ne pli longe, ĉar la humideco de la homa spiro povas tie endanĝerigi la salajn kristalojn. Komplete ĉirkaŭita de la salkristalaj naturaj muroj (vidu foton), mi sentis min kvazaŭ gnomo, kiu mirakle enmarŝis la internon de la kristalriĉa geodo. Mi dubas ke eĉ Norda Poluso aŭ la surfaco de Luno posedas ion similan eksterordinare belan...

Pola esperantisto vizitis Puramon Chong

La lastan 27an de Februaro, merkredo, vizitis al la kliniko de Puramo Chong, vicprez. de nia asocio pola esperantisto, poeto s-ro Waldemar Grzegorz Lipowicz (*vidu supran poemon*), kiu nun vojaĝas tra urboj de Usono. Okazis gaja babilado kaj sekvis poste komuna vespermanĝo en korea restoracio en kiu partoprenis ankau s-ro Gregory Dolgin kaj prof. Les Kordylewski. S-ro Lipowicz donacis al Puramo CHONG sian poem-libron, *El Sonĝoj Haltitaj*, kiun li petis ankaŭ donace disdoni al la membroj de Chicago Esperanto-Societo.

Poemo

SOPIRO

Waldemar Grzegorz Lipowicz
el Polland

Sopiras mi al la tagoj
de la pasinteco
kiam mi karesis
pejzaĝon de l'amikeco.
Sopiras mi al la noktoj
kiam niaj pensoj
estis tiom liberaj
freŝaj kaj ensorĉplenaj.

Mi sopiras, mi sopiras
al la vivo de l' printempo
al la vivo de l' tenereco
al la vivo en amo

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:
Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; $40 jare;
Familia membro : $30, Regula: $20
Studenta aŭ pensiula: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

22an de Aprilo – Rick Miller (Viskonsino) "Vent-energio"

27an de Majo – Karlo Offutt "Hinduismo kaj Bagavatgitao"

22an de Junio – tradicia pikniko

Atenton: la programo povos esti ŝanĝata. La prelegontoj estas invitataj